8-a jaro. — N-ro 8-9 (90-91) Aûg.-Sept. 1922.

Belga Esperantisto

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Aliĝinta al la Unuiĝo de la Belga Perioda Gazetaro

Direktoro :
FRANS SCHOOFS, Kleine Beerstraat, 45
ANTVERPENO

ENHAVO. — XIVa Universala Kongreso. — Oficiala Esp-a Organizo. — Bonvenon, Gefratoj. — Bonveno de la Prezidanto de Finnl. — Malgranda infano kaj eho. — Bruselaj legendoj: Manneken-Pis. — Belga Kroniko. — Belga Gazetaro. — Internaciaj Semajnoduo : Alvoko; Paroladoj 1922 ĉe Intern. Universitato. — Por Monumento Zamenhof. — Por « Esp.-Ligilo ». — Gratuloj. — Quelques Opinions. — Esp. à la Soc. des Nations. — Autres nouvelles. — Eenige Oordeelen. — Esperanto in den Volkenbond. — Andere nieuwsjes. — Akdemia Fako pri Konkursoj kaj premioj. — Aŭtonoma Muziknotado. — Esperanto-Film 5, 6, 7. — Tagmezmanĝo. — Branckelektanta Virineto. — Arbaro printempe. — Spritaĵoj. — La Pipro-Salujo. — Bibliografio.

JARA ABONPREZO : Fr. 10.—

ANTVERPENO
1922

Belga Ligo Esperantista

Ĉiujara Kotizajo

(Jaarlijksche bijdrage — Cotisation annuelle) :

Ordinaraj membroj (Gewone leden. — Membres ordinaires) fr. 5.—
Ordinaraj membroj kun abono de «Belga Esperantisto» fr. 10.—
Protektantaj membroj (Besch. leden — Membres protecteurs) fr. 25.—
Bonfarantaj membroj (Leden-weldoeners — membr. bienf.) fr. 50.—

HONORA KOMITATO:

Prezidanto: Princo LEOPOLDO DE BELGUJO, Duko de Brabant.
Prezidinto: Generalo Grafo LEMAN.
Membroj: S-roj BERNIER, Skabeno, St. Gilles.
BRAUN, antaŭa urbestro Gent.
CH. DESSAIN, Urbestro de Mechelen.
F. COCQ, Skabeno de la Publika Instruado, Ixelles.
DEVREUX, Urbestro, Charleroi.
DEWANDRE, Skabeno de la Publika Instruado, Charleroi.
DUBOIS, Direktoro de la Supera Komerca Lernejo, Antwerpen.
Senatano HOUZEAU DE LEHAIE, Mons.
Senatano LAFONTAINE, Bruselo.
A. MAERTENS, Prezidanto de «Banque de Flandre», Gent.
O. ORBAN, Profesoro de la Universitato, Liége.
PASTUR, Konstanta deputato de la Provinco, Marcinelle.
B-no RUZETTE - VAN CALOEN DE BASSEGHEM, ministro de Terkulturo.
J. SCHRAMME, advokato, Brugge.
J. SPINHAYER, antaŭa, Urbestro, Verviers.
D-ro R. VAN MELCKEBEKE, hemiisto, Antwerpen.
VERDONCK, Urbestro, Gentbrugge.

Oficiala Organo de la Ligo

" BELGA ESPERANTISTO ,,

Redakta Komitato:

S-roj COGEN, PAROTTE, PETIAU, SCHOOFS, VAN SCHOOR, WITTERYCK.

Jara Abonprezo: Belglando Fr. 10. — (specialaj kondiĉoj por Grupoj)
Eksterlando : Fr. 12.—.

Anoncoj:	12 numeroj.	6 numeroj.	3 numeroj.	1 numero.
1 paĝo :	Fr. 200.—	105.—	60.—	30.—
1/2 paĝo :	Fr. 105.—	55.—	35.—	20.—
1/3 paĝo :	Fr. 70.—	40.—	25.—	15.—
1/4 paĝo :	Fr. 55.—	35.—	20.—	12.50
1/8 paĝo :	Fr. 30.—	20.—	15.—	10.—

Internaj kovrilpaĝoj: samaj prezoj + 50 %.
Dorsa kovrilpaĝo : samaj prezoj + 150 %.

AGADA KOMITATO

Prezidanto: S-ro A. J. Witteryck, Steenbrugge.
Viceprez.: S-roj L. Cogen, Ninove; L. Champy, 17, r. Richard, Anvers.
Ĝenerala Sekretario: S-ro H. Petiau, St. Lievenslaan, 60, Gent.
Kasisto: S-ro F. Mathieux, 15, Avenue Bel-Air, Uccle.
Direktoro de la Oficiala Organo: Gazetara Servo: Fr. Schoofs, 45, kleine Beerstraat, Antwerpen.

MEMBROJ ELEKTITAJ DE LA GENERALA KUNVENO.

S-roj Babilon (Jumet), L. Champy (Antwerpen), D-ro Dupont (Beyne-Heusay, S-ino Elworthy - Posenaer (St. Mariaburg), Jos. Parotte (Verviers), Frans Schoofs (Antwerpen), D-ro W. van der Biest (London) kaj Oscar Van Schoor (Antwerpen).

DELEGITOJ DE LA GRUPOJ.

Antwerpen: Antverpena Grupo Esperantista: S-ro A. Van de Velde, 10, Olijftakstraat.
» La Verda Stelo, S-roj G. Vermandere, M. Jaumotte.
» La Suda Lumo, S-ro J. Jacobs, 444. Boomsche steenweg.
» Esperantista Junularo: R. Broeckhove, Maatstr., 52.
Boom : Grupo Esp., J. Clerbaut, Groenhofstr..
Brugge: Bruĝa Grupo Esperantista, S-ro A. J. Witteryck, Steenbrugge. F-ino Y. Thooris, 4, rue de l'Outre.
Charleroi: Grupo Esperantista, A. Henraut, 30, r. Ferrer, Lodelinsart.
Gent: Genta Grupo Esperantista, H. Petiau, 60, St. Lievenslaan, Gent. C. Van de Velde, Zwarte Heirestraat, Gentbrugge —
» La Progreso, S-ro L. Cogen, Ninove, kaj F-ino E. Colyn, Ryhovelaan, 21, Gent.
Gendbrugge: «Espero»: S-ro De Bruyker, Gestichtstraat, 96.
Ledeberg: La Tagiĝo, S-ro L. Varendonck, 113, Kerkstr., Gentbrugge.
Liége: Lieĝa Ago, S-roj Oger, 37, rue de Campinne, Liége, kaj F. Derigat, rue St. Eloi, 11, Liége.
Lier: Liera Stelo, S-ro J. Leflot, 47, Vaartlaan, Lier.
Mechelen: Grupo Esperantista Axel Baesens, Statiestraat, 16.
St-Gilles-Bruxelles: Antaŭen, F. Mathieux, 15, Av. Bel-Air, Uccle.
St. Nikolaas-Waes: Unueco estas Forteco, S-ro A. De Bosschere, 3, Place de la Régence.
Sclessin: Grupo Esp.: J. Bissot, rue de Trazegnies, 72.
Spa: Soc. Espéranto de Spa, S-ro J. Desonay, Place des Glorieux, 3.
Verviers: Esperantista Grupo, S-ro Joseph Pirnay, 146, Ch. de Heusy. J. Herion, rue des Raines, 8.

Nederlandsche

Gist- & Spiritusfabriek

(Nederlanda Fabriko de Fermento kaj Alkoholo)

Anonima Societo

Societa Sidejo : DELFT (Nederland)

Fabrikejo : BRUGES-BASSINS (Belgujo)

Filioj : BRUSELO kaj HUY (Belgujo)

Produktaĵoj :

Reĝa Fermento

Alkoholo kaj Brando

Eldistilaj Rekrementoj

Fako "Fermento kaj Rekrementoj" : Bruges-Bassins

Fako "Alkoholo kaj Brando" : 378, Avenue Van Volxem, Bruselo

Telefono : Bruges N° 8 / Bruxell. BR. 8338 / Huy N° 40

Telegr. : Bruges / Bruxelles / Huy — "Gistfabriek"

8a Jaro — Aug.-Sept. 1922 — N° 8-9

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

Redakcia parto : FRANS SCHOOFS, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen

Abonoj kaj Monsendoj : FERN. MATHIEUX, 15, Avenue Bel-Air, Uccle

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

XIVa Universala Kongreso de Esperanto

Helsinki (Finnlando), 8-16 aŭg. 1922.

La kongreso organizita de niaj finnaj samideanoj brile sukcesis. Ĝi estis plene inda je la 13 antaŭaj ĝeneralaj festoj de la Esperantistaro.

La nombro de partoprenintoj, ĉ. 1200, superis ĉies atendon, konsiderante la elcentran geografian situacion de la kongresurbo.

Se la programo alportis ĉiujn aranĝojn laborajn kaj plezurajn, la jam liveritaj raportoj elspiras unuaniman laŭdon pri la zorgoplena kaj praktika kunmetado teknika de la tuta, komplikita organizado de Universala Esperanto-Kongreso; kaj tiurilate ne povas nomi la dekkvaran modela.

Ni ne priskribos detale ĉiujn okazintajojn de la kongreso, kaj limigos nian kronikon je la notado de la plej gravaj faktoj, laŭ organiza kaj propaganda vidpunktoj.

Dum la solena malferma kunsido de la 9a aŭg. (en Nacia Teatro), prezidita de S-ro V. Loimaranta, Ministro de instruado de Finnlando, S-ro Prof. E. N. Setälä, fama finna sciencisto kaj filologo, eldiris belegan festan paroladon, kiu havigas al la tutmonda Esperantistaro, ne nur valorplenan kuraĝigon sed aron da trafaj argumentoj por la t. n. artefarita lingvo internacia. Ni presigos tiun dokumenton en unu el la proksimaj numeroj de B. E.

Nia eminenta Esperantista oratoro Privat rememoris, ke Finnlando estas la unua regno, kie nia movado renkontis oficialan atenton de la parlamento.

La oficialaj delegitoj, kies listo sekvas, alparolis la kongreson: Por: Internacia Labora Oficejo (Genève): s-o Tarelli. Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (Genève): s-o Rodolfo Horner, Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (Bruxelles): s-o Hendrickx. Ministro de Publika Instruado de Bulgarujo: s-o Krum Mladjov. Ministro de Publika Instruado de Ĉehoslovakio: s-o Profesoro Stejskal. Ministro de

Klerigado de Estonio: s-o V. Vaher. Ministro de Internaj Aferoj de Germanujo: s-o Prof. D-ro Dietterle. Ministro de Publika Instruado de Litovio: s-o L. Alseika. Ministro de Publika Instruado de Hispanujo: s-o Felix Diez. Ministro de Publika Instruado de Nederlando: s-o Isbrücker, Ĉefa Inspekcio Fervoja de Ruslando: s-o Valentinov. Registaro de Urugvajo: s-o Enrique Legrand. Urbo Milano (Urbestro D-ro Filipetti): s-o I. Piatti.

Por la foiroj: s-o K. Ojala, (Finnlando): s-o R. Kreuz. (Frankfurt): s-o Dietterle. (Leipzig) s-o Pitlik (Praha). Bedaŭrinde F-ino Jennen, oficiala delegitino de la belga ministro de Sciencoj kaj Artoj, lasthore malhelpita, ne ĉeestis la kongreson. Ĉi tiu ankoraŭ aŭdis salutparolojn de 37 naciaj kaj lingvaj delegitoj. S-ro Jan Jacobs, el Antverpeno, parolis por la belgaj samideanoj.

La tri laboraj kunsidoj okazis en la Nobelara Domo, historia loko, kie troviĝas la blazonoj de la nobelaj familioj de Finnlando.

Speciale salutis la kongreson blinda samideano S-ro Berg, kaj blinda esperantistino, F-ino Varma Jarvenpää, deklamis kortuŝan poezion, kiun ŝi verkis je la honoro de la kongreso.

S-ro Hendricx insiste petis la samideanojn daŭrigi sian subtenon al « Esperanta Ligilo », la gazeto de niaj blindaj geamikoj.

La raportoj de la Lingva Komitato, Akademia kaj Konstanta Kom. de Kongresoj estas aprobitaj sen diskuto.

La Komisiono pri ĝenerala organizo, kiu sukcesis dum sia laborado, realigi interkonsenton inter la du flankoj de nia movado, t. e. Centra Oficejo Esperantista kaj Universala Esperanto-Asocio, prezentis en sia nomo tiun interkonsenton al la kongreso en formo de konkreta propono pri ĝenerala organizo de nia novado.

Laŭ klarigoj pri tiu interkonsento donitaj de S-ro Privat, la Esperantistoj estas konsideataj laŭ du manieroj: kiel anoj de naciaj, regionaj kaj lokaj societoj kaj grupoj, kiuj zorgas pri propagando en siaj landoj, kaj laŭ individuoj, kiuj grupiĝas internacie por la ĝenerala uzado de la lingvo. Laŭ la unua maniero, ili grupiĝos en **Konstanta Reprezentantaro** de la Naciaj Societoj, kun sidejo en Paris, kaj laŭ la dua maniero, ili grupiĝos en UEA. Tiuj du organismoj interkonsentos por elekti **Centran Esperanto-Komitaton,** kiu zorgos pri la ĝeneralaj interesoj de la tuta movado. Tiu Komitato ne konsistos el tri anoj de la Reprezentantaro kaj el tri anoj de UEA, sed el ses anoj, kiuj reprezentos ĉiujn ambaŭ organizaĵojn. Tiu Centra Komitato delegos Komisionon por organizi la Kongresojn, kaj ĝi povos organizigi ankaŭ teknikajn internaciajn konferencojn. La **Lingva Komitato** restas sendependa. La Esperantistoj grupiĝas ankaŭ en **Fakaj societoj,** kiuj havas kunsidojn dum la Kongresoj, prezentas kandidatojn al la Lingva Komitato kaj povas kunlabori pri la organizo de la teknikaj konferencoj.

Post longa diskutado, la kongreso akceptis la proponitan tekston (Vidu p.133.), kaj voĉdonis ankaŭ jenajn 3 rezoluciojn pri praktikaj rimedoj por funkciigi la akceptitan proponon:

1. — La Kongreso, por faciligi la tujan formadon de la Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj petas s-on Generalon Sebert kaj s-on Chavet, ke ili bonvolu tuj funkcii kiel provizoraj Prezidanto kaj Generala Sekretario de la Reprezentantaro, ĝis la momento, kiam ĝi mem estos fiksinta sian estraron.

2. — La nuna Komisiono pri Ĝenerala Organizo bonvolu plenumi la oficon de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita.

La anoj de tiu Komisiono estas s-oj Warden, Chavet, Stettler, Privat, Arnold, Page, Poncet kaj s-o Isbrücker, kiu anstataŭis s-on Page en tiu ĉi Kongreso. S-o Page estos Prezidanto de la Komisiono.

3. — La Kongreso petas la Centran Komitaton, ke ĝi zorge revizu kiel eble plej baldaŭ la antaŭajn regularojn pri organizaj aferoj, por ke ili akordiĝu kun la akceptita interkonsento.

S-ro Privat, prezidante la 2an kunsidon, sciigas, ke li jam ricevis interesajn raportojn pri okazintaj fakaj kunsidoj, kaj li memorigas, ke la sekretarioj de la Fakaj Kunsidoj devas ĉiuj sendi siajn raportojn al la Kongreso, kaj prezenti al la Kongreso, por ke ili fariĝu dezirespimoj de la tuta Kongreso, la plej gravajn el iliaj rezolucioj, inter tiuj kiuj havas ĝeneralan intereson.

La Prezidanto komunikas al la Kongreso la decidojn de la Faka Kunsido de la Ruĝa Kruco kaj atentigas pri la graveco de tiu rezolucio. Li aldonas, ke la Esperantistoj havas la devon interrilati kun la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco kaj proponi siajn kunlaborojn. Li promesas publikigi trifoje ĉiujare en « Esperanto » adresaron de junuloj, anoj de la Ruĝa Kruco, kiuj deziros korespondadi.

S-o Horner, oficiala reprezentanto de la Ruĝa Kruco, petas la Kongreson aprobi rezolucion, ĉar tiu aprobo alportos grandan helpon por la propagando de Esperanto en tiu rondo.

S-o Warden ankaŭ proponas, ke la Kongreso konfirmu tiun rezolucion, kaj li memorigas, ke Esperanto estis jam uzita de la Ruĝa Kruco dum la milito pere de la franca registaro, kaj tiu uzado estis tre fruktodona.

La rezolucio de la Faka Kunsido de la Ruĝa Kruco estas unuanime akceptata.

La Prezidanto komunikas leteron de la Komitato de la Y. M. C. A. kiu akreditas s-on Horner por ĝin reprezenti en la Kongreso, kaj li petas s-on Horner danki tiun gravan kaj potencan asocion por la signo de intereso, kiun ĝi donis al nia movado.

Zamenhofa Monumento.

La kongresanoj havas sub la mano la raporton de s-o Applebaum, honora sekretario de la komitato. Kiel ĉefan citindaĵon ni notas, ke la kolekto donis ĝis nun la jenan rezultaton: en brita mono p. s. 72.7.3, en ĉehoslovaka 4543,65 kr., en pola 95314 mk., 500 belgaj frankoj, 60 finnlandaj markoj, 80 liroj, 5 sv. kronoj, 1 holanda guldeno. (Tio estus en svisa mono proksimume 2600 frankoj).

La kunveno aplaŭde akceptas jenan dezirespriman:

La Kongreso esprimas la deziron, ke ĉiuj Esperantistaj societoj instigu la ĝeneralan daŭrigon de la donacado por la monumento de D-ro Zamenhof.

S-o Stan. Essigman (Warszawa) nome de la Loka Komitato por la Starigo de l'Monumento informas, ke ĝi estos preta post du jaroj kaj espereble inaŭgurota okaze de la 16-a Kongreso okazonta en Warszawa. Li plie petas la akcepton de jena rezolucio:

Ĉar montriĝis ĉe la Kongreso profunda deziro je baldaŭa starigo de monumento sur la tombo de nia Majstro, kaj konsiderante la troŝarĝon de la ĝisnuna komitato, meritante koran dankon, la Kongreso trovas necese kaj utile esprimi jenan deziron:

a) La Loka Komitato en Warszawa konsistu el ses anoj, po du el la 3 societoj garantiantaj plenan interkonsenton kaj pretigon de la monumento ĝis la difinita tempo.

b) La Loka Komitato kunvenu almenaŭ dufoje dum monato: protokoloj estu sendataj al la Esperanta gazetaro.

c) La komitato rajtas akcepti aliajn personojn, kiuj per faka aŭ morala helpo povas utili al ĝi.

La kunveno akceptas unuanime.

S-o Setälä anoncas la alvenon de la kuponkartoj,konigas la prezoo kaj metodon de vendado. Pri tiu detale raportas s-o Kötz, menciante la malfacilajojn ĉe la presigo.

S-o Essigman informas, ke monumento ne povas esti starigata sur publika placo pro lokaj cirkonstancoj; ĝi estos tombo-monumento respondanta al la modesta vivo de nia Majstro.

D-ro Privat alproksimiĝante al s-ino Zamenhof resumis la penson, kiu gvidis la iniciatintojn, skizas la penigan vojon, kiun trairis nia Majstro. Li dankas al la vidvino por la heroa persisteco kaj kuraĝo, eblegintaj starigon de nia movado. Dum plej malhelaj tagoj la konscio agi por la bono de venonta generacio ne forlasis ŝin, kaj se la Esperantistaro rememoras la kreinton de la lingvo, ĝi neniam forgesas la helpon, kiun alportis al li lia edzino.

Varma aplaŭdata de la kunveno D-ro Privat premas la manon de S-ino Zamenhof, kiu kortuŝe respondas, dankante.

La Ĝenerala Sekretario de UEA legas leteron de s-o Sklenčka, del. en Hradec-Králové (Ĉehoslovakujo), kiu insistas je pli da iniciatemo ĉe la delegitoj. Li montras kiamaniere UEA kaj nia movado povas alporti utilon per laŭcela uzado de informoj, anoncoj kaj presajoj.

S-o Jakob klarigas manieron de efika propagando. aranĝita de s-o Istel, del. en Wiesbaden, per elmontro de leterkovertoj, kiujn la C. O. ricevis el aro da landoj. Rondirigo de fotografajo komprenigu la aranĝon.

Komisiono pri Instruado.

Raportas D-ro Privat skizante la kreon de tiu ĉi Komisiono, sekve de instigo de la Pola Societo. Rezultiĝis el tio la Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejoj, okanzinta en Genève, kiu donis

la eblecon al reprezentitaj registaroj, senpartie juĝi laŭ la metoda laborplano la akiritajn spertojn. Li informas pri sendo de raporto al la ministroj de instruado ĉiulandaj, citas la efikon ĉe pluraj el ili, mencias favoran decidon de la albana registaro, promesanta enkondukon de nia lingvo kiel devigan instrufakon post organizo de la lernejoj. Aludas, ke en 151 germanaj lokoj okazas nun oficiala instruado de Esperanto al infanoj, kritikas la indiferentecon de multaj propagandistoj, alvokas je kunhelpo, disciplino, sistema laboro.

Priskribante la Konferencon en Genève, D-ro Privat atentigas pri la valoro de tiaj pure teknikaj kunvenoj, kiuj per relative malmulte da mono kaj klopodo havas sukceson tute apartan kaj bonan. Estas intencate daŭrigi tiajn fakajn kunvenojn.

S-o Arnhold leviĝas, esprimante la dankon pro la bonega aranĝo de la Konference de Genève. Li proponas sendon de telegramoj al Poŝtista Konferenco nun okazanta en Berlin, proponanta alprenon Esperanto.

La Kongreso poste akceptis la inviton. okazigi la XVan kongreson universalan en Nürnberg (Germanujo). (1).

---

(1) Al la legantoj, kiuj deziras havi pli detalan priskribon pri ĉiuj okazintajoj (ankaŭ pri la plezuraj aranĝoj) de la kongreso en Helsinki, ni tre konsilas. havigi al si la gazeton « Esperanto Triumfonta» N-ojn 98-99-100-101-102, kaj «Esperanto» N° de septembro 1922

Oficiala Esperantista Organizo

Rezolucio prezentita de la Komisiono por Generala Organizo kaj akceptita de la XIVa Kongreso.

La Kongreso rekomendas ke, por koncentrigi la fortojn de la Esperantistaro kaj trovi monrimedojn por subteni la ĝeneralan movadon, la Oficiala Esperantista Organizo estu jena:

I.

1. La naciaj societoj elektu Konstantan Reprezentantaron de la Naciaj Societoj (K. R.), konsistantan el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo, kun nombro da voĉoj proporcia je la nombro de anoj por kiu ĝi pagis kotizon al la kaso de la K. R. Tiu reprezentantaro starigos sian internan regularon. Ĝi povos havi Prezidanton kaj Ĝeneralan Sekretarion elektitajn ekstere de la Reprezentantaro. Ĝi zorgos pri la reciprokaj informado kaj kunlaborado de la naciaj societoj por komunaj celoj kaj pri ilia monsubteno al la komunaj Institucioj de la Esperantistaro.

2. La individuaj Esperantistoj grupiĝu internacie per aliĝo al Universala Esperanto Asocio, kiu disvastigas la ĝeneralan uzadon de la lingvo.

3. La Fakaj (teknikaj kaj profesiaj) Societoj grupigu la Esperantistojn por propagando kaj uzado en specialaj rondoj.

II.

La Konstanta Reprezentantaro (K. R.) kaj Universala Esperanto Asocio (UEA) interkonsentos pri la elekto de

CENTRA ESPERANTO-KOMITATO

kiu konsistos el ses anoj, oficantaj dum tri jaroj kaj reelektotaj po du ĉiujare.

Tiu Centra Esperanto-Komitato zorgos pri la ĝeneralaj interesoj de la movado. Ĝi starigas centran kason kaj por tio enspezas donacojn, kotizojn de kongresoj, kotizojn de Naciaj Societoj pere de la Reprezentantaro, kaj subvencion de UEA.

III.

La Lingva Komitato estas sendependa, sed la Naciaj Societoj povas prezenti kandidatojn al ĝi.

IV.

La Centra Esperanto-Komitato decidas pri la okazigo de la Universalaj Kongresoj kaj komisias ilian organizon al

KONSTANTA KONGRESA KOMISIONO,

kiu enhavos 2 reprezentantojn de la Centra Komitato, du anojn de la Loka Komitato de la estinta kongreso, du anojn de la Loka Komitato de la estonta kongreso, kaj du Kuratorojn de la Kongresa kaso.

La Universalaj Kongresoj konsistas el:

solena malferma kunsido;

laboraj kunsidoj, en kiuj la oficialaj institucioj prezentas raportojn kaj aŭdas la rimarkojn kaj dezirosprimojn de la kongresanoj;

fakaj kunsidoj;

kunsidoj de la diversaj oficialaj komitataj aparte aŭ kune.

La Institucioj nomataj «oficialaj) estas:

la Lingva Komitato (L. K.) kaj ĝia Akademio,

la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R),

la Universala Esperanto Asocio kun sia Komitato (UEA),

la Centra Esperanto-Komitato (C. K.) kun sia Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.).

V.

Krom la Universalaj Kongresoj povos okazi periode oficialaj teknikaj konferencoj, laŭ decido de la Centra Komitato, kiu tamen ne zorgos pri konferencoj politikaj aŭ religiaj.

VI.

La oficialaj komunikoj de la oficialaj institucioj estas publikigotaj pere de Esperantistaj gazetoj.

La oficialaj dokumentoj kaj raportoj estas publikigotaj per zorgo de la Centra Komitato en

OFICIALA DOKUMENTARO

laŭ siaj nunaj formatoj.

VII.

La nuna Komisiono pri Ĝenerala Organizo plenumos la oficon de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita.

Bonvenon, Gefratoj!

(Saluto al la Kongreso en Helsinki)

Bonvenon, gastoj, ho ĉiuj ĉi,
Vi atenditaj gefratoj!
Salutas kore, varmege mi.
Bonvenon, ho geamatoj!
Kaj jena mia deziro estu:
ke plej korege Vi ĝuu, festu
kaj postmemoro ĝi dolĉa restu.

Kongresan tempon ni uzu ĝin,
por diligenta laboro,
en ĝi sukceso nur helpos nin,
nelacigebla fervoro.
Ho, sankta estas ja nia celo.
Leviĝu preĝo do al cielo,
nin benu Dio sub verda stelo.

Sonoras kanto en mia kor'
por ĝojo granda, feliĉa,
funebronuboj peliĝis for,
somero faris min riĉa.
Ho gekaruloj, vi povis veni.
Vin dolĉe volis mi ĉirkaŭpreni
kaj kore ĉiujn Vin danki, beni.

Ke Vi, gefratoj, ĉirkaŭas min
apenaŭ kredi mi povas;
sed la feliĉo, ho tamen ĝin
en efektivo mi trovas.
Dum lasta vintro kaj en sufero
mi revis en la kongresespero
kaj atendadis je la somero.

Kaj la someron mi havas nun
en koro, en la naturo,
pri ĝi rakontas brilanta sun'
kaj gaja ventomurmuro.
La koro estas en harmonio,
ĝi ĝojon sentas pro ĉio, ĉio,
kaj kantas laŭdon al sia Dio.

Mi sentas kiel la pacanĝel'
la rondon nian benanta
migradas milde sub verda stel'
kaj sub standardo flagranta.
Je lia veno foriĝis timo
el brusto mia, el la animo.
Kuraĝon sentas la kor' sen limo.

Sub verda stelo ja ĉiuj ni
pli bone venkos la sorton.
Ni vidas lumon kaj tiu ĉi
por viv' kreskigas la forton;
en ve da brilo ni noktinfanoj
batalas kune la man' en manoj
kaj nin ne venkos la uraganoj.

Akceptu mian saluton Vi,
ho, sopiritaj gefratoj!
Feliĉe, ĝoje ekkrias mi
bonvenon, ho geamatoj!
Ne Finnoj havas juvelojn, orojn,
al Vi ne donos ni ortrezorojn,
sed simplajn, varmajn koramoflorojn.

Varma Järvenpää,
(blinda esperantistino).

Bonveno de la Prezidanto de Finnlando

La Finnlando Respubliko diversfoje montris sian favoron al Esperanto per oficiala helpo. Dufoje ĝia Parlamento decidis finance subteni la laboron de la nacia societo. Ĝiaj delegitoj en Genevo ricevis instrukcion subteni Esperanton ĉe la Ligo de Nacioj. La XIVa kongreso estis nova okazo por oficiala helpo. La registaro de Finnlando subvenciis ĝian organizon. Diplomata konsilisto el la Ministrejo por eksterlandaj aferoj lernis Esperanton kaj faris paroladon pri nacia kulturo. Kelkaj ministroj de la registaro partoprenis en la honora komitato de l'kongreso flanke de la diplomataj reprezentantoj de la cefaj landoj en Helsinki (internalie la franca sendito, S-ro ministro Ribot). La ministro por Publika Instruado malfermis mem la kongreson.

La alta protektanto de la kongreso estis la Prezidanto de la Respubliko, kiu sendis al laborkunsido sian ĉefadjudanton, perfekte lernintan Esperanton. Vendredon 11an de Aŭgusto la Prezidanto invitis en sian palacon la estraron de l'kongreso kaj ĉiujn reprezentantojn, parolintajn dum la malferma kunsido. La akcepto estis komence tre solena kaj fine tre intima. Gvardia orkestro ludis la «Esperon» kaj la Himnon de Finnlando dum la Prezidanto manpremis la gastojn post individua prezentado al li kaj al lia ĉarma edzino.

Poste teo estis servita en alia salono de l'palaco. Dum tuta horo la Prezidanto kaj liaj Ministroj interparolis kun la kongresanoj interese demandante pri la progresoj de Esperanto. Afabla kaj modesta, la edzino de l'Prezidanto simpatie bonvenigis ĉiujn eĉ per kelkaj frazoj en Esperanto, tre korekte parolitaj. Ŝi petis nian poeton Kalocsay deklami la belan festpoemon de li verkitan.

Ĉiuj partoprenintoj ricevis tre agrablan impreson de tiu plej afabla gastigo kaj danke konstatis, ke la regnestro de Finnlando vere faris ĉion eblan por montri al la kongresanoj, ne nur ĝentilan bonvenon sed ankaŭ delikatajn amikaĵojn kaj publikan aprobon de nia afero. La esperantistaro ne forgesos tion.

(El « Esperanto »).

LA MALGRANDA INFANO KAJ LA EĤO

Bela malgranda knabo ludis en la herbejo. Li kriegis: «ho, ho!» kaj li aŭdis la samajn vortojn reiri de najbara arbaro.

Surprizita la infano ekkriis: «Kiu vi estas?» al kio la voĉo respondis:» Kiu vi estas?». Furioze la juna homo rediris:» Vi estas freneza» kaj la voĉo respondis: «Vi estas freneza!»

Plena de kolero, la knabo, kiu estis mensogulo, kuris plendi al la patro. «Mia filo, diras tiu ĉi, anstataŭ esti disputemulo, vi estu kvieta, afabla kaj ĝentila, la arbaro estos sama kontraŭ vi: memoru ke la konduto de la aliaj estas la eĥo de la via...

(tradukis C. Robson.)

Bruselaj Legendoj

de V. Devogel

(Tradukita (*) el franca lingvo de la Grupo «Antaŭen», Bruselo)

Antaŭparolo.

La fremdulo aŭ la bruselano, ne bone konante niajn malnovajn kutimojn, kaj kiu trapasus, promenante, je l'fino de somertago, unu el la popolplenaj kvartaloj de nia antikva urbo, vidus interesegan scenon, kiu bedaŭrinde malofte allogis pentristan penikon.

Vesperiĝas. La tago estinte tre varma, la loĝantoj venas enspiri freŝan aeron sur la sojlo de siaj domoj, sidantaj sur malnovaj, nefirmaj seĝoj aŭ sur benkoj, kaj plejofte, sur la trotuarrando aŭ sur la antaŭdomaj ŝtuparoj. Viroj kaj virinoj, tiuj lastaj preskaŭ ĉiuj brakportantaj infanon, ridas, babiladas, alvokas unu la alian, de la komenco ĝis la fino de l' strato: voĉeksplodoj; bruaj ekkrioj aŭdiĝas, interrompataj de la knaboj, kiuj krias, kuras, puŝas unu la alian aŭ ludas, kaj kies nudaj piedoj klaketas kontraŭ la pavimojn.

La viroj fumas sian pipon, la junulinoj trikas, -kutima okupado de la virinoj el tiuj kvartaloj. Ĉiuj parolas samtempe: la vortoj sin renkontas, la mokajoj interplektiĝas, la ridoj eksonas! Ĉio tio formas konfuzan tuton superfluganta al la ĉielo, kiu mallumiĝas, kaj kiun oni ekvidas supre, inter du vicoj da tegmentoj, kiuj ŝajne intencas atingi unu la alian, tiom mallarĝaj estas la stratoj.

Tamen, iom post iom, eknoktiĝas. La bruoj formortas unu post alia, la patrinoj reeniras hejmen kun la bubetoj, kaj la viroj sin direktas al la plej proksimaj trinkejoj ; nur restas kelkaj grupoj da gejunuloj, kiuj babiladas.

* * *

Manneken-Pis

Kie la leganto ekkonas la plej malmolan bruselanon

I.

Statueto, mi benas Vin.

Mi benas vin, tial ke Vi estas la plej gaja memorajo de nia antikva urbo; tial ke oni amas Vin, ĉu ne; tial ke Vi estas la ĝojo de la malgranduloj, kiuj iras, akvumante, tra la vojkruciĝoj, ĉe la anguloj de la stratoj, kontraŭ la ŝtonojn, neatente pri la pasantoj, kaj tial ke eĉ la ĉagrenmienaj plenkreskuloj ne povas vidi Vin neridante .

(*) Tradukita kun la permeso de la aŭtoro, S-ro Devogel, kaj de la eldonistoj de la originala franca verko «Les Légendes Bruxelloises», Lebègue & C^ie^, Office de Publicité, rue Neuve, Bruxelles. Je la nomo de F-ino Jennen, kiu gvidis la tradukan laboron, kaj je la nomo de nia revuo, ni tutkore dankas aŭtoron kaj eldonistojn pro ilia afableco.

Ho! Kiu scios iam vian devenon? Via historio perdiĝas en la tempoj, kiel tiuj de multe da homoj: savintoj de la patrujo, aperintaj dum la malvenkaj tagoj malgraŭ ke oni ne sciis de kie ili venis ; genioj, artistoj, poetoj, kies infaneco estas tute ne konata.

Nenio mankas al via gloro: legendo prenis Vin, popolo respektas Vin; Vi estas honorata, nobeligita, ordenigita; la maljunaj soldatoj, tiuj kiuj vidis malfeliĉojn kaj triumfojn, salutis Vin; unue ŝtono, poste bronzo, reproduktis Viajn trajtojn.

Kaj Via nomo senfine vivos en la jarcentoj de la jarcentoj.

La maljuna ĉefanĝelo, Via najbaro, protektanto de la urbo, super kiu li regas, de sur sia dentumita turo, Sankta Mikaelo simboligas Progreson faliganta Nescion per sia minacanta glavo; Vi, «Manneken Pis" Vi estas ĉiam simbolo de la gajega flandra ĝojo, de la bona kaj larĝa fama ridemo de niaj avoj.

Statueto, mi benas Vin.

II.

Oni diras :

Iam estis malbona sorĉistino.

Tiu sorĉistino estis maljunega, kaj, de longe, ŝi loĝis en dometo sur la angulo de la «rue du Chène» (1) kaj de la «rue de l'Etuve». Tiu malbona virino malfeliĉigis preskaŭ ĉiujn siajn najbarojn kiuj multe timis ŝin. Ŝi estis malpura kaj malbelvestita, kaj ŝi, nur vespere, eliris. Kien ŝi iris tiel tute sola? Neniu tion sciis, kaj neniu provis ekscii, ĉar, por tio, oni devus sekvi ŝin, kaj kiu tion kuraĝis?

Kiam malfruiĝinta burĝo, reirante hejmen, renkontis ŝin, li malproksimiĝis, kaj la infanetoj kaŝis sian kapon en la patrinajn jupojn kiam ŝi pasis, silenta kaj kurbita.

Estis ankaŭ bona maljunulo.

Tiu bona maljunulo estis tiom amata kiom la malbona virino estis malamata; li multan bonon faris al la malriĉuloj kaj oni estis feliĉa ekvidante lin. La infanetoj tute ne timis lin.

Iam, knabeto pasis tra la «rue de l'Etuve», (2) haltis kaj, ne rigardante kie li estis, ekkontentigis naturan bezonon kontraŭ la pordo de la sorĉistina domo.

Tion oni ĉiam vidis kaj oni ankoraŭ vidas ĉiutage.

Sed la sorĉistino, eble aŭdinte ne kutiman brueton, eliris el sia domo, kaj, ekvidinte la knabeton, kiu jus finis, diris al li, kolerege:

"Vi malhonoris mian domon farinte kion vi faris. Mi kondamnas do vin, daŭrigi tiel dum ĉiamaj jarcentoj.»

Poste, ŝi reeniris hejmen.

Estas malbona virino, ĉu ne? Kaj la infano ne meritis tiel severan punon. Ankaŭ, kion oni subite vidis? La bona maljunulo aperis, portante en la brakoj, ŝtonan statueton kiun li metis anstataŭ la knabeto. Li prenis tiun ĉi per la mano kaj kondukis lin ĉe liaj gepatroj.

(1) Kverko-strato (N. de la trad.)

(2) Fornostrato (N. de la trad.)

De tiu tempo, la statueto ĉiam anstataŭas la naivan infanon.

* * *

Oni ankaŭ diras :

Iam estis familio konsistanta el patrino, patro kaj fileto. Tiu ĉi estis tri-aŭ kvarjara kaj, ĉar li estis ilia nura infano, liaj gepatroj amis lin, dorlotis lin kiel princidon. Ian festtagon en Bruselo, ili metis siajn belajn dimanĉajn vestajojn, vestigis belete sian fileton, prenis lin per la mano kaj eliris.

Estis multe da personoj sur la stratoj kaj la bubo, kiu volis ĉion vidi, tiris siajn gepatrojn tien ĉi kaj tien, tiamaniere ke fine-, oni ne scias kiel-, li estis forigita de ili kaj restis sola meze de la popolamaso.

Li ne atentis pri tio; li rigardis kaj tre amuziĝis. Li opiniis, tamen, ke la plenkreskuloj lin multe puŝis. Kompreneble, ili ankaŭ, volis ĉion vidi.

Samtempe, liaj gepatroj serĉis lin ĉie. «Tiel malgranda! Ia akcidento trafos lin!» pensis la patrino.

La patro ankaŭ estis malkvieta.

Kaj ili serĉis, ili serĉadis... Sed noktiĝis kaj ili ne trovis lin. Kvar tagoj pasis kaj ilia filo ne estis jam reveninta.

Ho! Kiel malgajaj estis la gepatroj! Kiel ili ploris! Ili ne plu esperis revidi lin !

Tamen la patro de la malfeliĉuleto ankoraŭ serĉis kaj, la kvinan tagon, alveninte sur la angulon de la «rue de l'Etuve» kaj de la «rue du Chène», li ekvidis... kiun? Sian filon en sintenado, kiu ne lasis dubon pri lia momenta okupado.

Vi certe pensas, ke tuj la patro premis la knabeton en la brakoj, kisis lin, portis lin, kurante al la patrino.

La patro, feliĉa pri la retrovo de sia infano, volis ke tiu okazintaĵo ĉiamiĝu, kaj tiacele, li starigis, ĉe la loko, kie la bubo haltis, ŝtonan statueton kiu, de tiam, fluigas klaran akvon en la basenon malsupren.

* * *

Oni ankoraŭ diras :

Dum tiu tempo, Bruselo estis ĉirkaŭita de potenca malamiko.

Scienculoj rakontos al vi glorajn agojn de la Bruselanoj kaj iliaj malamikoj; ili diros, ke la sieĝo daŭris longajn tagojn, ke la civitanoj sin kuraĝe defendis, kaj ke fine, la malamikoj devis foriri.

Sed kion ili ne diros (ĉar ili ĝin ne scias), estas ke la atakintoj estis tre inteligentaj. Vidante ke estis neeble preni nian kuraĝan urbon, ili decidis brulegigi ĝin. Estis malbone, ĉu ne? Tamen, ili ekbruligis meĉon kaj foriris.

La civitanoj, tute feliĉaj pro sia libereco, ne vidis la fajreton, kaj la urbo estus certe tute brulinta se knabeto ne estus vidanta la fajron kaj malgraŭ sia junegeco, estus komprenanta la danĝeron.Kion fari? Li havis nenion. Li ne hezitis kaj ekakvumis la meĉon, kiu estingiĝis.

Ho! Kiu scios iam vian devenon? Via historio perdiĝas en la tempoj, kiel tiuj de multe da homoj: savintoj de la patrujo, aperintaj dum la malvenkaj tagoj malgraŭ ke oni ne sciis de kie ili venis ; genioj, artistoj, poetoj, kies infaneco estas tute ne konata.

Nenio mankas al via gloro: legendo prenis Vin, popolo respektas Vin; Vi estas honorata, nobeligita, ordenigita; la maljunaj soldatoj, tiuj kiuj vidis malfeliĉojn kaj triumfojn, salutis Vin; unue ŝtono, poste bronzo, reproduktis Viajn trajtojn.

Kaj Via nomo senfine vivos en la jarcentoj de la jarcentoj.

La maljuna ĉefanĝelo, Via najbaro, protektanto de la urbo, super kiu li regas, de sur sia dentumita turo, Sankta Mikaelo simboligas Progreson faliganta Nescion per sia minacanta glavo; Vi, «Manneken Pis" Vi estas ĉiam simbolo de la gajega flandra ĝojo, de la bona kaj larĝa fama ridemo de niaj avoj.

Statueto, mi benas Vin.

II.

Oni diras :

Iam estis malbona sorĉistino.

Tiu sorĉistino estis maljunega, kaj, de longe, ŝi loĝis en dometo sur la angulo de la «rue du Chêne» (1) kaj de la «rue de l'Etuve». Tiu malbona virino malfeliĉigis preskaŭ ĉiujn siajn najbarojn kiuj multe timis ŝin. Ŝi estis malpura kaj malbelvestita, kaj ŝi, nur vespere, eliris. Kien ŝi iris tiel tute sola? Neniu tion sciis, kaj neniu provis ekscii, ĉar, por tio, oni devus sekvi ŝin, kaj kiu tion kuraĝis?

Kiam malfruiĝinta burĝo, reirante hejmen, renkontis ŝin, li malproksimiĝis, kaj la infanetoj kaŝis sian kapon en la patrinajn jupojn kiam ŝi pasis, silenta kaj kurbita.

Estis ankaŭ bona maljunulo.

Tiu bona maljunulo estis tiom amata kiom la malbona virino estis malamata; li multan bonon faris al la malriĉuloj kaj oni estis feliĉa ekvidante lin. La infanetoj tute ne timis lin.

Iam, knabeto pasis tra la «rue de l'Etuve», (2) haltis kaj, ne rigardante kie li estis, ekkontentigis naturan bezonon kontraŭ la pordon de la sorĉistina domo.

Tion oni ĉiam vidis kaj oni ankoraŭ vidas ĉiutage.

Sed la sorĉistino, eble aŭdinte ne kutiman brueton, eliris el sia domo, kaj, ekvidinte la knabeton, kiu jus finis, diris al li, kolerege:

"Vi malhonoris mian domon farinte kion vi faris. Mi kondamnas do vin, daŭrigi tiel dum ĉiamaj jarcentoj.»

Poste, ŝi reeniris hejmen.

Estas malbona virino, ĉu ne? Kaj la infano ne meritis tiel severan punon. Ankaŭ, kion oni subite vidis? La bona maljunulo aperis, portante en la brakoj, ŝtonan statueton kiun li metis anstataŭ la knabeto. Li prenis tiun ĉi per la mano kaj kondukis lin ĉe liaj gepatroj.

(1) Kverko-strato (N. de la trad.)

(2) Fornostrato (N. de la trad.)

De tiu tempo, la statueto ĉiam anstataŭas la naivan infanon.

* * *

Oni ankaŭ diras :

Iam estis familio konsistanta el patrino, patro kaj fileto. Tiu ĉi estis tri-aŭ kvarjara kaj, ĉar li estis ilia nura infano, liaj gepatroj amis lin, dorlotis lin kiel princidon. Ian festtagon en Bruselo, ili metis siajn belajn dimanĉajn vestaĵojn, vestigis belete sian fileton, prenis lin per la mano kaj eliris.

Estis multe da personoj sur la stratoj kaj la bubo, kiu volis ĉion vidi, tiris siajn gepatrojn tien ĉi kaj tien, tiamaniere ke fine-, oni ne scias kiel-, li estis forigita de ili kaj restis sola meze de la popolamaso.

Li ne atentis pri tio; li rigardis kaj tre amuziĝis. Li opiniis, tamen, ke la plenkreskuloj lin multe puŝis. Kompreneble, ili ankaŭ, volis ĉion vidi.

Samtempe, liaj gepatroj serĉis lin ĉie. «Tiel malgranda! Ia akcidento trafos lin!» pensis la patrino.

La patro ankaŭ estis malkvieta.

Kaj ili serĉis, ili serĉadis... Sed noktiĝis kaj ili ne trovis lin. Kvar tagoj pasis kaj ilia filo ne estis jam reveninta.

Ho! Kiel malgajaj estis la gepatroj! Kiel ili ploris! Ili ne plu esperis revidi lin !

Tamen la patro de la malfeliĉuleto ankoraŭ serĉis kaj, la kvinan tagon, alveninte sur la angulon de la «rue de l'Etuve» kaj de la «rue du Chêne», li ekvidis... kiun? Sian filon en sintenado, kiu ne lasis dubon pri lia momenta okupado.

Vi certe pensas, ke tuj la patro premis la knabeton en la brakoj, kisis lin, portis lin, kurante al la patrino.

La patro, feliĉa pri la retrovo de sia infano, volis ke tiu okazintajo ĉiamiĝu, kaj tiacele, li starigis, ĉe la loko, kie la bubo haltis, ŝtonan statueton kiu, de tiam, fluigas klaran akvon en la basenon malsupren.

* * *

Oni ankoraŭ diras :

Dum tiu tempo, Bruselo estis ĉirkaŭita de potenca malamiko.

Scienculoj rakontos al vi glorajn agojn de la Bruselanoj kaj iliaj malamikoj; ili diros, ke la sieĝo daŭris longajn tagojn, ke la civitanoj sin kuraĝe defendis, kaj ke fine, la malamikoj devis foriri.

Sed kion ili ne diros (ĉar ili ĝin ne scias), estas ke la atakintoj estis tre inteligentaj. Vidante ke estis neeble preni nian kuraĝan urbon, ili decidis brulegigi ĝin. Estis malbone, ĉu ne? Tamen, ili ekbruligis meĉon kaj foriris.

La civitanoj, tute feliĉaj pro sia libereco, ne vidis la fajreton, kaj la urbo estus certe tute brulinta se knabeto ne estus vidanta la fajron kaj malgraŭ sia junegeco, estus komprenanta la danĝeron.Kion fari? Li havis nenion. Li ne hezitis kaj ekakvumis la meĉon, kiu estingiĝis.

Tiamaniere, knabeto savis Bruselon.

La fakto estis rapide konata kaj, je l'honoro de la ago de la juna bravulo, la Bruselanoj starigis statuon, kiu eternigas la heroajon.

* * *

Oni fine diras :

«Manneken-Pis» estas infaneto, kiun Judo ŝtelis iam kaj forportis en sian loĝejon.

En tiu tempo, la Judoj estis konsideritaj kiel malbenitaj; oni forpelis ilin el la urboj, aŭ, kiam oni permesis ilin tie resti, ili devis loĝi en speciala kvartalo; oni riproĉis ilin ĉiajn religiajn kutimojn; oni facile kulpigis ilin pro multaj krimoj; ili estis timataj kaj malestimataj de ĉiuj.

La priparolita Judo volis, oni diris, mortigi la knabeton. Samtempe, la patro de la infano ageme esploradis la urbon; ĉar li estis granda sinjoro, la Judo timis; ian vesperon, li kondukis la infanon al la angulo de la strato, kie li estis forpreninta lin. Tie la gepatroj retrovis sian fileton kaj ili konstruigis fontanon memoranta la ĝojon, kiun ili eksentis retrovante lin.

III.

Historio de la plej malgranda burĝo de Bruselo.

Nia statueto jam ekzistis en 1452a. Tiam, oni nomis ĝin «Manneken-Pis» aŭ «Juliaenske Borre» (fontano de Juliĉjo). Oni ankoraŭ citis ĝin sub tiu nomo en 1498a. En 1668a, eble pli frue eĉ, ĝi definitive estas «Manneken-Pis».

Unue, ĝi estis el ŝtono. Sed, la 13an de Aŭgusto 1619a, fama brusela skulptisto, Jérôme Duquesnoy, estis petata fandmodeli ĝin al bronzo.

Li ricevis por sia verko, sumon da kvindek florenoj. La 16an de Decembro, la ŝtonskulptisto Daniel Raessens, entreprenis liveri akvujon por tiu fontano. En 1770a, oni anstataŭis la piedestalon, kiu portis Manneken-Pis per niĉo el blua ŝtono.

De tiam, Manneken Pis konis multajn aventurojn; li havis feliĉajn sed ankaŭ malfeliĉajn tagojn.

En 1695a, la soldatoj de Ludoviko la XIVa bombardadis Bruselon kaj okazigis multege da domaĝoj en nia urbo; la ruzaj Bruselanoj forprenis sian protektaton de lia piedestalo, por ke li ne estu atingita per la francaj kuglegoj.

Oni lin remetis la 19an de Aŭgusto 1695a, je l'granda ĝojo de la popolo, kiu triumfe portis lin, kaj oni skribis, super li, latinajn versojn kies traduko estas: «Oni metis min sur ŝtonon, kaj nun, mi altigas mian kapon super miaj malamikoj: »

La 1an de Majo 1698a, la elektanto de Bavarujo, Maximilien Emmanuel, ĝenerala estro de Nederlando, donis feston al la arkpafistoj. Je la sesa frapo, li faligis la birdon, lokitan sur la «grosse Tour» (turego) kaj estis, laŭ kutimo, proklamita reĝon de la korporacio. En tiu okazo, Maximilien donacis al ĉiuj kunfratoj kostumon el drapo blua de Bavarujo. Li ankaŭ donis unu al Manneken-Pis. Ne miru pri tiu malavaremo; la elektanto povis esti donema, ĉar la urbo, por festi lian reĝecon, donis al li dudekkvin mil florenojn. Krom tio, antaŭ

kelkaj monatoj, ĝi estis donacinta al lia naskiĝinta filo, belegan lulilon, kaj tio, malgraŭ grandegaj perdoj kiujn la urbo suferis pro la bombardado en 1695a.

Poste, ĉirkaŭ 1745a, Angloj elprenis Manneken-Pis kaj portis lin ĝis la belga urbeto Grammont. Loĝantoj de tiu urbo sukcesis ŝteli ĝin kaj, kiam la malamikoj estis forlasintaj la landon, ili redonis ĝin al la Bruselanoj; sed antaŭe, ili vidigis ĝin sur la granda placo de sia urbo kie, longatempe, oni povis admiri kopion, nun detruitan. Fatalo ne volis, ke du Manneken-Pis ekzistu. Ne estas du Aleksandroj !

En 1747a, dum regado de Ludoviko la XVa, la Bruselanoj suferis malfacile la francan superregadon kaj la nerespektadon de siaj kutimoj kaj liberecoj. Iam kelkaj francoj forprenis Manneken-Pis. Sed, ĉar la malfeliĉuleto embarasis ilin, ili forlasis lin je kafeja pordo, sur la angulo de la strato «Petite Ile» (malgranda insulo). Oni retrovis ĝin tie kaj oni reportis ĝin sur ĝian piedestalon. Baldaŭ poste, li estis insultita de francaj grenadistoj. Estis tro. La popolo ne povis toleri, ke oni malrespektu ĝian protektaton. Ribelo okazis kaj sango fluis. Ludoviko la XVa punis severe la aŭtorojn de la malbona ago, kaj, por detrui, en la spirito de la Bruselanoj de la malbonan impreson pri siaj soldataj, li donis, al nia heroo, riĉan kostumon, ĉapelon kun plumfasko kaj glavon; li donis al li, krom tio, la personan nobelecon kaj kreis lin kavaliron de la fama « ordre de Saint-Louis » (3), pro tio, la soldatoj devis fari al li la militan salution

Fine, li estis forprenita lastfoje, dum la nokto (4an 5an de Oktobro 1817a) de liberigita punlaborulo. Sed li estis retrovita iom da tempo poste, kaj la ŝtelisto ricevis lia punkolringon la 26an de Novembro.

Oni remetis nian heroon sur lian piedestalon la 6an de Decembro de la sama jaro, kaj la tiamaj ĵurnaloj gloris la okazon.

Jen, kion diris la «Gazette du vrai libéral» (7an de Decembro 1817).

«Manneken-Pis reenfunkciiĝis hodiaŭ. Ĉiuj loĝantoj vidis plezure, kiel zorge oni riparis lin. Feliĉe, li reaperis sen tiuj vanaj ornamaĵoj per kiuj oni senutile ŝarĝas lin en la festtagoj. Lia bonfaro estas pli abunda ol iam : la akvo kiun li disdonas estas sendube nektaro, laŭ la rapidemo de la popolamaso kiu volas ĝui ĝin».

Kaj la «Journal de Belgique».

«La fama Manneken-Pis estas relokita hodiaŭ en sian niĉon, je l'granda kontenteco de siaj najbaroj; li estas tre bone riparita kaj estas nun ŝraŭbita sur bronza tableto.»

La ŝildo de l'apuda kafejo, tiuokaze, havis la sekvantan surskribon: «Al Manneken-Pis, retrovita de la samregnanoj je ĉies kontenteco.» Tiu anonco malaperis poste.

* * *

Ne estis ĉiam akvo kiun nia amiketo disĵetis.

Antaŭe, dum grandaj festoj, okaze de la eniro de regnestro en lia «bona urbo» Bruselo, aŭ de ia ajn alia grava okazo, Manneken-Pis, forlasante sian ĉiutagan kutimon, ĵetis en la aeron mielakvon aŭ

(3) Ordeno de Sta Ludoviko (N. de la trad.)

vinon, je la granda ĝojo de l'popolo, kiu malfermis ravitajn okulojn kaj ankoraŭ pli ravitan buŝon. Kaj estis plezurige vidi la popolon, kiu rapidas al la benita fonto kun potoj, boteloj, flakonoj, mezuriloj, kruĉegoj, puŝante unu la alian, batalante, kurante, kriante «Vivu ! Vivu ! La junuloj ĝojegis, la plenaĝuloj ridis, ĉiuj amuziĝis; kaj, superstaranta la amason, tie, sur sia piedestalo, kvieta meze de tiu ekscitegeco, Manneken-Pis, ridetante, verŝis malavare la ĉarman likvaĵon! Sed tiuj disdonoj de longe ne plu okazas. Niaj geavoj apenaŭ memoris la tagon, kiam la bona infano verŝis, lastfoje, la dian trinkaĵon. Akvo, ĉiam akvo; kaj dum la vintro, la knabeto, tute nuda, malgraŭ la malmildeco de nia klimato, vidas la akvon malfluidiĝintan ĉirkaŭ si en hela kaj ornama glacio, kiu aldonas pentrindan aspekton al la monumento.

Tamen en1890a, donemaj koroj entreprenis refari la antikvan kutimon. Dum la somero, kiam Bruselo havis grandajn festojn, Manneken-Pis ŝanĝis, dufoje en la daŭro de du tagoj, sian jarcentan kutimon. La unuan fojon, li donis al ni vinon, la duan «lambic», (4) la faman bruselan bieron.

Estis, certe, ĉarma spektaklo; floraj kurtenoj ornamis lian niĉon ; la girlandoj rebrilis en speguloj lokitaj sur la flankoj de lia dometo kaj estigis brilantan koloraron; nova vivo ŝajnis plivigligi nian heroon per festkostumo vestitan, kun tripinta ĉapelo kaj glavo. Antaŭ li, troviĝis tablo, sur kiu du viroj rikoltis la multekostan likvaĵon ; ĉirkaŭ la tablo, aliaj personoj disdonis ĝin.

Kaj, el la densa amaso, kiu premiĝis sur la apudaj stratoj, supreniris ridadoj, ĝojaj krioj, feliĉaj bruoj de la infanoj kiel de ĉiuj.

Tamen, ĉiam trankvila kaj ĉiam ridetanta, tronante meze de l'floroj, Manneken Pis, feliĉa kiel adorita princo, plenumis sian ĝojan laboron.

Li ĝin ĉiam plenumu !

* * *

Tia estas la verdirema historio de tiu kiun liaj samlandanoj surnomis «la plej malnova burĝo» de la urbo. Tia estis lia sorto !

Granda skulptisto fandmodelis lin bronze; la elektanto Maximilien riĉigis liajn vestaĵojn, la reĝo Ludoviko la XVa nobeligis lin kaj kreis lin kavaliron de Sta Ludoviko, Napoleono la 1a faris lin ĉambelanon. Poetoj kantis lin, riĉaj burĝoj fondis por li rentojn; ĉirkaŭ 1822a, sinjorino el Bruselo testamentis al li mil florenojn; oni vestigas lin belege por la Difesttago kaj por la kermeso de Bruselo; oni pagis lakeon por lin vesti. Liaj rentoj estas grandaj, kaj, ĉar liaj gustoj estas modestaj, ĉar li malmulte foruzas, eble li baldaŭ havos riĉecon egalan al tiu de la financreĝoj.

Oni riproĉas lin — sed kiu ne havas malamikojn ? — ĉar singardeme, li ordiĝis laŭ la opinio de ĉiuj regnoj kaj ĉar li surmetis la emblemon de ĉiuj reĝimoj. Oni diras: hodiaŭ vi tamen gloriĝas esti Belgo. Vi estas prudenta persono, sed vi ne estas patrioto!

Nu! estas eraro. Jes, Manneken-Pis estas patrioto. Ĉu estas lia

(4) Elparolu: Lambik.

kulpo se la samtempuloj de liaj diversaj aĝoj donis al li la insignojn, kiujn ili respektegis je tiuj diversaj epokoj? Ve! la malfeliĉuleto ne povis paroli! Li estus forĵetinta tiujn emblemojn kaj, fidela al la malnova urbo, kie li naskiĝis, li estus paradinta en la faldojn de la Brusela flago.

Ĉar, oni ĉiam forgesis ke Manneken-Pis estas, antaŭ ĉio, Bruselano.

Belga Kroniko

ANTVERPENO. Antv. Grupo de Esperantistaj diamantistoj. — En la salono «Volksvlijt», Breydelstrato, okazis festo la 29an de Julio, okaze de la datreveno de la fondiĝo de la grupo. Gesamideanoj el ĉiuj grupoj de la urbo, kaj plimulte da neesperantistoj plenigis la salonon kaj ĝuis atente la zorge kunmetitan programon, kiu konsistis el kantoj kaj deklamadoj parte Esperantaj, parte nacilingvaj. Eĉ arta dancado ne mankis. Ĉiuj kunlaborintoj meritas laŭdon kaj tutkoran dankon, precipe la profesiaj artistoj, kiuj senpage, nur pro simpatio al nia movado, helpis sukcesigi la feston. Ni nomu la famekonatan aktoron Piet Janssens, kiu deklamis Esperante kaj flandre, la kantistinon S-inon Verhasselt Smits, la du flutistoj S-oj A. Van Varenbergh kaj D. Sternfeld, kiuj per sia ludo ensorĉis la multnombran publikon. S-o L. Van der Schelden belege kantis, kaj nia malnova samideano S-o A. Van de Velde deklamis i. a. «La bela Sonĝo» de Rosa Junck kaj «La Vojo» de LL. Zamenhof. Ges-oj Di Rossi el Paris montris ravajn dancojn, kaj juĝante laŭ la brua aplaŭdo, kiun ili rikoltis mi kuraĝas diri, ke tiu arto plaĉis al ĉiuj ĉeestintoj. «Last not least», F-ino A. Swalf, kiu havis la pezan, sendankan taskon akompani la geartistojn fortepiane, kiun ŝi plenumis majstre. — Dum malgranda interakto S-o Posener dankis la prezidanton instruanton J. Swalf, pro lia sindonemo al nia afero, kaj prezentis al li, en la nomo de la grupo, belegan florgarbon. S-o J. Swalf, dankas la socian fakon de la Antverpena Ligo de Diamantistoj, kiu ne ĉesis efike helpi la Esp. Grupon; li ankaŭ dankas siajn kunkomitatanojn, kaj havas kelkajn agrablajn vortojn por la artistoj. — La brile sukcesinta festo finiĝis per premilotado, post kiu komenciĝis la dancado, kiu daŭris... ĝis... tre malfrue !

La Verda Standardo. — Tiu Grupo kiu laboras en la Sindikato de la Komercaj Oficistoj de Antverpeno organizis propagando-vesperon Lundon 4an de Septembro en la kleriga grupo « Hooger Streven ».

S-o De Ketelaere faris paroladon pri la neceseco kaj utileco de Esperanto precipe en la Komerco Internacia. Interesa debato sekvis tiun klarigon kaj ekmontris ke la plimulto de la ĉeestantaro estis konvikita. Kelkaj personoj sin tuj enskribis por la proksima kurso kaj la aliaj promesis sekvi ĝin laŭ ebleco de la cirkonstancoj.

BRUĜO. — Dum la maja monato la estraro de la «Bruĝa Grupo Esperantista» ageme propagandis kaj penis varbi multajn partoprenantojn al la XIa kongreso en Sankta Nikolao. La grupo havis la plezuron akcepti Sron. Karlo Poupeye, fidela ano de la grupo, kiu nuntempe dejoras en Germanujo. La simpatia prezidanto de la grupo el Verviers, Sro. Pirnay, vizitis la grupon je la granda kontenteco de la membroj. Fino. Henriette Ronse kaj Sro. Nestor Van Eggen deklamis kaj ĉiuj ĝojis pri la agrabla vespero. Okaze de la kongreso en St. Nikolao, kelkaj gesamideanoj el Verviers vizitis la marbordon kaj Bruĝon. Dum la kunveno de la 8a de junio la Prezidantino havis la plezuron deziri la bonvenon al Sroj. Blause Etienne kaj Hérion. Post raportoj pri la kongresa agado, faritaj de Fino. Thooris kaj Sro. Hérion, la gesamideanoj disiĝis kun la espero ke ambaŭ grupoj de Verviers kaj Bruĝo prosperu kaj plivastiĝu.

GENTO. — Malfermiĝis Esperanto-kurso por ĉirkaŭ 25 geanoj de la sindikato de socialistaj geinstruistoj. Polemiko okazis en la ĉiutaga jurnalo « La Flandre Libérale » pro artikolo malfavora al Esperanto kaj al niaj Francaj samideanoj. Bonaj protestaj artikoloj aperis tiu-okaze.

MEHLENO. — Okaze de la Ekspozicio pri komerco kaj industrio, okazinta en Mehleno dum la aŭgusta monato, la tica grupo organizis Esperantan ekspozicion kiu tre bone sukcesis.

VERVIERS. — La manifesto de la tutmonda instruistaro aperinta al la Genèva konferenco estis france tradukata kaj dissendata de l loka grupo al kelkaj oficialuloj inter kiuj la urbestro, la Skabeno pri publika instruado kaj la lernejdirektoro.

La kursoj por la laboristoj de «La Lainière» gviditaj de Sroj. Dohogne kaj Pirnay, finiĝis la 21an de majo; rezultis kelkaj novaj membroj por la grupo. Ankaŭ la kurso de Sro. Hérion en la Popola universitato finiĝis la 29an de majo. Je tiu okazo la 17 restantaj gelernantoj dankfestis sian instruinton; unu el ili legis dankespriman leteron dum aliaj oferis, je la nomo de ĉiuj, belegan florbukedon kaj riĉan bankbiletujon kie! memorajon. Sro. Hêrion, tra kortušita, esprimis sian grandan surprizon kaj sinceran dankon. La gelernintoj fariĝis ano de la grupo.

Kvanto da Esperanto-Film N° 3 estis dissendataj al 14 geanoj de la « Pedagogia Societo ».

La dua ekskurso intergrupa okazis la 25an de majo, la grupanoj de Liége, Sclessin kaj Verviers partoprenis multnombre; la Spaanoj sen-kulpiĝis. La celo estis la grotoj de Adzeux kaj Grandchamps, apud Louveigné. Ĝi bone sukcesis kaj la partoprenintoj konservos agrablan memoron pri ĝi.

Dimanĉon 2an de Julio okazis en Verviers granda festo kaj konkurso por flagoj. La tiea Esperantista grupo profitis la okazon por ekspozicii sian flagon kaj partopreni la sekvantaron kiu trairis la urbon. Ĝi gajnis monpremion donacitan de la ekspozicio.

Sabaton 15an de junio okazis ĝenerala kunveno de la grupo dum kiu oni akceptis 22 novajn membrojn jus finintajn la kurson.

... JUVELARTO ...

Speciala laborejo por riparado kaj aliformigo
Oraj Edzoringoj laŭ mezuroj
Aĉetas oron kaj arĝenton

Jos. Herion, Ĵuvelisto 8, rue des Raines VERVIERS

" Navigation Uniforms „

Uniformoj el pilota drapo - Indigoblua seriko
"Standaert„ jakoj

L. Van Hove & F. D'Hamers

39, Rue St. Paul, ANTVERPENO

Koresponda Fako:

DEZIRAS KORESPONDI :

S-o P. Czechowski, « Pocisk», Rembertów, Varsovo, Polujo, deziras korespondi kun instruistoj metüstaj kaj interŝanĝi lernolibro,n por lernejoj metüstaj

S-o O. F. Neumann, Recherweg 15, Limmerich Rhein, Germanujo.
S-o Eriko Spillner, Schrotdorferstr., 6, Magdeburg, Germanujo.
S-o Kurt Brunn, Weststr., 17, Leipzig Leutsch, Germanujo.
S-o Walter Schulz, Greifswaldestr., 47, Berlin, N. 55, Germanujo.
S-o Alberto Weber, Altwasser II, Hochwaldstr., 6, Germanujo.
S-o Kurt Küchler, Rabenstein apud Chemnitz, Saksujo, Germanujo.
S-o Hans Iffländer, Alsenstr., 88, Breslau, Germanujo.
S-o Šila Karol, oficisto, Libŝfca n/Vit. u. Prahy, Ĉehoslovakujo.
S-o Francisko Tomuzek, N. 245, Sucha Gorna, Ĉehoslovakujo.
S-o Karel Myŝak, Riegrova, 7 Praha-Zizkov, Ĉehoslovakujo.
S-o Karl Tinna, Karmelitska, 54643, Praha III, Ĉehoslovakujo.
Stefano Lippay, Serhaz-u. 42, Miskolcz (Hugarujo).
I. Szöke, fögimnazium, Szentes (Hungarujo).
Jenö Rosenberg, Sörhdz u. 64, (Hungarujo).
Karlo Abroŭ, Temetö ut. 28, Szombathely, (Hungarujo).
Stefano Nyiry, Hungaria ut 32 n, Kitspest II, (Hungarujo).
Jozefo Hegert, str. Honved 16, Kaposvar (Hungarujo).
Alexander Enten, Baross-u 109, Erzebetfalva (Hungarujo).

DEZIRAS KORESPONDI :

Josefo Krausz, felso malom str. 18, Pécs (Hungarujo).
Jan Grzesiak, Izkota Lotuikow, Bydgoscz (Polujo).
Stefan Block, Anczewshut, 7, Cvovo (Lwow).
J. Polisiakiewicz, Internato, ul. Wolnanska 253, Lodz, (Polujo).
Adolfo Szczerba, Przykopa 13, Cieszyn (Pola Slezio).
I. Burakiski, Niemeka ul d. 29/33, Wilno (Polujo).
Adolf Sturmayr, Aubach a/Donaŭ (Austrujo).
Erwin Altenburger, Haydnstr., 10, Salzburg (Austrujo).
Robert Eckert, Stiftgasse 8, Wien VII (Austrujo).
Karl Menhard Schlosser, Bundesbahnwerkstätte, Salzburg-Itzling (Austrujo).
Josef Hauer, Burgerspitalgasse 3 11/19, Wien VI.
Josef Spruĉannski, oficisto ĉe ŝtata policejo,. Jokai str., Komarno (C.sl.)
Karlo Zseman, studanto ĉe komerca akademio,Vilky Osek,(Ĉehoslovak).
L. Farkaŝ, Pl. de l"Fruntiškano 8, Bratislava (Ĉehoslovakujo).
B. Benetka, 243, Tyrŝova, Jiĉin (Ĉehoslovakujo).
Aleksandro Trahlerow, Harjkovskaja 32, Bahmut (Don. gub) Ukrainio (Rusl.)
Wilhelm Dörken, fervojisto, Büderich, (Mörs-Rhein-Germanujo).
Erich Hunger, Friedrichstr., 24, Merseburg a/Saale (Germanujo).
Kurt Mehnert, Seminarstr. 11, Auerbach, V., (Germanujo).
Walter Strenger, Metzstr. 48 F. F Stuttgart (Germanujo).
Willi Lippmann, Hauptstr., Glashütte (Saksujo).
Bernardo Kirchner-Orlando, Kriegsbergstr., 22. 11. Stuttgart. (Germ.).
Rudolf Heinz, Hanauerlandstr., 137, IV. Frankfurt a/Main.
Reinhold Wolf, Leipzigerstr. 16, Engelsdorf/Leipzig.
Jos. Ippen, Uedingerstr, 180 Crefeld, (Germanujo).
F-ino Margarete Graske, N. 500 b., Wurgwitz/Dresden.
Adalberto Geiger, Krämerstr. 7, Stuttgart/Gablenberg (Germanujo).
Eduardo Capdevilla, Carders 297da 3a, Barcelona (Hispanujo).
Nikola Grand, st. Regenska 79, Sofia (Bulgarujo).
F-ino Suzanne Duboc, 33 rue de Nestrie, Le Hâvre (Francujo).
Erik Fagerström, Slottsgatan 57, Oskarsham (Svedujo).
Jan W. Schouten, Jr., Gasthuislaan 186r., Haarlem (Nederlando).
Svante Kivinen, Nokia (Finnlando).
Artur Klavin, Alsvika ula N. 11, Aluksne (Latvujo).
Rob. Silwester, Rohu t. 13-9, Tallinn (Estonujo).

Jenö Rosenberg, Sörhdz u. 64, (Hungarujo).
Erwin Altenburger, Haydnstr. 10, Salzburg (Austrujo).
J. Polisiakiewicz, Internato, ul. Wolnanska 253, Lodz, (Polujo).
Adolfo Szczerba, Przykopa 13, Cieszyn (Pola Silezio).
Josef Spruĉannski, oficisto ĉe ŝtata policejo, Jokai str. Komarno
Stefano Nyiry, Hugaria ut 32 n, Kispest II, Hungarujo).
Robert Eckert, Stiftgasse 8, Wien VII (Austrujo).
(C. sl.). ... .
Wilhelm Dörken, fervojisto, Büderich, (Mörs-Rhein-Germanujo).
Walter Strenger, Metzstr. 48 F, Stuttgart (Germanujo).

Vizitu BRUGES (Belgujo)
arta urbo je 15 Km. de la Norda Maro
kaj haltu :

HOTEL DU CORNET D'OR
No 2, Place Simon Stevin

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista.
Centra situacio je 2 minutoj de la Stacidomo.
Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝajoj, bonaj vinoj kaj tre moderaj prezoj.
La hotelestro, samideano S-o Verbeke, parolas Esperante, france, flandre kaj angle.

Banque de la Flandre Occidentale
Anonima Societo fondita en 1881
BRUGES — 56, rue Flamande, 56 — Telefono 89
Agentejoj en Blankenberghe, Heyst kaj Knocke

Diskonto Monŝanĝo
KREDITKONTOJ
Pruntedono sur obligacioj kaj ĉiuj valordokumentoj — Depono de Akcioj — Borsmendoj por ĉiuj urboj.
ANTAUMENDOJ — REGULIGOJ
Pago de kuponoj — Eldono de ĉekoj — Kreditleteroj — Aĉeto kaj vendo de fremdaj mono kaj biletoj — Luigo de monkestoj.

Multaj oficistoj parolas Esperanton S. D.

Duplicateur " EDISON DICK „
PEETERS & OOMS, 24 Rempart Ste Cathérine
Tel. 6353 ANVERS Travaux de Copies

SAMIDEANOJ! KURAĜIGU ESPERANTISTAJN FIRMOJN!
Por via somera ripozloko apud Marbordo, elektu:
Le Grand Hôtel d'Oostduinkerke
(Korespondas per Esperanto. — Parolas Esperante).
Agrabla restado dum tuta jaro
BONAJ MANĜAJOJ. BONAJ VINOJ. TRE MODERAJ PREZOJ
Generala agentejo por vendado de Francoj vinoj, oleoj.
Skribu al S-ro BENOIT, Grand Hôtel d'Oostduinkerke.
El ĉiuj enspezoj faritaj pere de Esperanto, S-ro Benoît dediĉos parton de 5 % al la propaganda kaso de «Belga Esperantisto».

Oni povas mendi la ĉi-subajn librojn ĉe la kasisto de la Ligo: S-ro F. Mathieux, 15, Avenue Bel-Air, Uccle (Bruselo).

(Poŝtĉek-konto: N° 39984).

Literaturo: Formortinta Delsuno René Vermandere		Fr. 4.—
» La Amuzistoj. — Miguel Zamacoïs		Fr. 3.50
» Kion Patrino povas suferi . — H. Conscience		Fr. 1.—
» Poemaro . — Tiflisano		Fr. 0.50
Teatraĵoj: Devo de Reĝo. — Nestor de Tière		Fr. 2.—
» Bietje. — Maurits Sabbe		Fr. 2.—
» La Ŝipeto. — J. De Vos		Fr. 2.—
Monologoj: La Turisto kun la Verda Stelo	O. Van	Fr. 0.75
» Judas'o		Fr. 0.75
» La Servistinoj	Schoor	Fr. 0.75
» La Telefono		Fr. 0.75
Muzikaĵoj: La Tagiĝo		Fr. 0.50
» Mi aŭdas vin		Fr. 2.50
» La Espero		Fr. 1.25
Diversajoj: Titolaro de eldonaĵoj en kaj pri Esperanto		Fr. 1.—
» La Vérité (De Waarheid). Esp. Ido.		Fr. 0.25
» Autour de l'Esperanto		Fr. 1.—
» Kolekto de 25 kongresaj poŝtkartoj		Fr. 3.—
» Poŝtkarto «La Espero»		Fr. 0.10
» Poŝtkarto Portreto D-ro Zamenhof		Fr. 0.10
» Poŝtkarto «Leĝert Esperanto»		Fr. 0.10
» Apprenez l'Esperanto		Fr. 0.10
» Manĝokarto		Fr. 0.25
» 100 Propagandaj sigelmarkoj		Fr. 2.—

LA TUTA KOLEKTO de ĉi-supraj eldonaĵoj estas aĉetebla je rabatita prezo de Fr. 25.—.

Ni posedas diversajn jarkolektojn de la Revuo «Belga Esperantisto», kiujn ni povas cedi je jenaj prezoj:

A. Plena sepjara kolekto, Fr. 65. — (Tre interesa dokumento por ĉiuj grupoj kaj propagandistoj. NI POSEDAS NUR 8 KOLEKTOJN.

B. Kolekto de la unua jaro 1908-09, Fr. 8. (Nur 18 kolektoj).
dua jaro 1909-10, Fr. 8. (Nur 18 kolektoj).
tria jaro 1910-11, Fr. 7. (Nur 64 kolektoj).
kvina jaro 1912-13, Fr. 5.—.
sesa jaro 1913-14, Fr. 5.—.

☞ FINE estas havebla granda kvanto de apartaj antaŭmilitaj numeroj de «Belga Esperantisto», kiujn ni povas liveri je Fr. 0.30 po kajero.

aŭ je Fr. 20.— po 100 ekzempleroj.

La samideanoj povas krei al si, je tre favoraj kondiĉoj tre interesan biblioteketon.

Aliflanke la apartaj numeroj de nia revuo estas tre taŭga materialo por agrabligi la grupajn kunvenojn kaj kursojn, en kiuj ili tre facile povas anstataŭi la nuntempe tre multekostajn legolibrojn.

Belga Gazetaro

BRUSELO. — « La Dernière Heure » (25-8) represas humoran bildon pri « la suspektita lingvo » el « l'Oeuvre », pariza jurnalo.

« Het Laatste Nieuws » (24 9); komuniko pri novaj kursoj en Mechelen.

« Peuple » (19-8): Fantazia, iom skeptika kroniko pri Esperanto. La aŭtoro finante sian artikolon diras: « Mi estas tute preta laŭdi Esperanton se iu volas klopodi por min konvinki ».

« Le Drapeau Rouge » (16-9): represo de la artikolo « La valeur de l'Esperanto » de Romain Rolland kiu aperis en « Sennacieca Revuo ».

ANTVERPENO.— «La Métropole» (4-8): letero el Parizo, kun timiga bildo de nia lingvo kaj de Esperantismo. La tuta artikolo estas brodita ĉirkaŭ la konata decido de la franca ministro de instruado. (11-8): komuniko el Helsinki pri la kongreso.

« Neptune » (16-9): komuniko el Genève pri la decido de la Ligo de Nacioj.

« De Diamantbewerker » (2, 9, 16, 23-9): sciigoj kaj propagandaj alvokoj en Esperanto kaj en flandra lingvo de la komitato de la Antv. Grupo de Esp. Diamantistoj.

GENTO. — « Gazette van Gent » (9-8): traduko el « Litova Stelo »; (26, 28-8): du leteroj de nia samideanino M. De Rycke, el Litovujo; (15, 19, 21-8, 15, 25, 30-9): Leteroj kaj dokumentigaj artikoloj pri la Kongreso en Helsinki kaj pri la juna Respubliko Finna, ankaŭ verkitaj de F-ino De Rycke; (18, 25, 8, 1-9): 9a, 10a kaj 11a lecionoj de Esperanto.

« La Flandre Libérale » (4, 5-8) Aprobaj leteroj el Parizo pri la decido de ministro Bérard; (9-8): protesta letero de la Komitato de la grupo « Progreso » el Gento; (12-8): alia respondo de esperantisto, kiu subskribas: « membro de la Belga Ligo Esp. ». La du respondoj sendube faris plej bonan propagandon inter la legantaro de la gazeto. (11-9): enhavo de la No 6-7 de « B. E. ».

MECHELEN. — « Gazet van Mechelen » (19-9): Bona artikolo pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. (23-9): komuniko pri novaj kursoj.

BRUGO. — «Schoolbloempje » (julio): dupaĝa artikolo pri Esperanto de nia prezidanto Witteryck. Ni represas la artikolon en nia Esperanto-Film.

LA LOUVIERE kaj MONS. — La gazetoj « Les Nouvelles » (18-9), « Le Progrès » (15-9), « La Province » (20-9) diras, ke la L. d. N. akceptis Esperanton kiel helplingvo internacia!

« La Nation Belge » (13-8): letero el Parizo kun favoraj komentarioj pri la decido de la franca ministro.

Alvoko al la Esperantistaj scienculoj, literaturistoj, artistoj, kaj ĉiuspecaj fakuloj

Je la tria fojo okazis dum la monato aŭgusto 1922a, en la Monda Palaco en Bruselo, Internacia Semajnoduo, dum kiu diverslandaj scienculoj, literaturistoj, artistoj, venis paroladi pri temoj koncerne sian profesion. Ĉiuj ĉefaj lingvoj de la civilizita mondo estis uzataj por tiuj paroladoj. Dank'al la sindonemo de S-roj Paul Otlet kaj Henri Lafontaine, la kreintoj kaj organizantoj de la Semajnoduoj, Esperanto estis ankaŭ akceptita de la unua fojo (1920) inter tiuj lingvoj.

En 1920a S-ino Cense, D-ro P. Corret kaj D-ro Vanverst; en 1921a S-roj Gabriel Chavet, L. Demarcy kaj Muffang venis trakti temojn diverssciencajn por pruvi tiamaniere la praktikan uzeblecon de nia lingvo. Nunjare kvin paroladoj plej diverstemaj estas donitaj de F-ino Jennen kaj de S-roj L. Demarcy, M. Somerling kaj L. Cogen.

Ĉiuj antaŭnomitaj gesamideanoj estas ĉu francoj, ĉu belgoj. Estus tamen necese, ke, estonte, ankaŭ alinacianoj partoprenu la semajnoduojn por ne nur montri per la traktotaj temoj la taŭgecon de nia lingvo en ĉiuj kampoj de la homa agado, sed ankaŭ por pruvi la similecon, la unuecon internacian de Esperanto, je la vidpunktoj de elparolado kaj de uzado.

Tial la subskribintoj, kunvenintaj la 29an de aŭgusto 1922a, en la Monda Palaco, ekstarigis Komitaton kun la celo varbi per la estontjaraj semajnoduoj, diversnaciajn amiklandajn paroladontojn Esperantistajn kaj esperas, ke la gesamideanoj komprenos la grandan gravecon de la akcepto kaj de la restado de nia lingvo en tiuj ĉiujaraj internaciaj manifestacioj de la spirita kaj arta vivo. Kaj kia nekomparebla kampo por la propagando inter la internacia intelektularo estas la Semajnoduo! Ili do faras varman alvokon al la amikaj gesamideanoj kiuj intencas vojaĝi dum aŭgusto 1923a al Bruselo por fari ian paroladon dum la venonta semajnoduo (ekzemple antaŭ aŭ post la tutmonda kongreso de Esperanto).

Ili invitas la fremdlandajn gesamideanojn por plenigi la Komitaton, reprezenti ĝin en siaj reciprokaj amikaj landoj kaj helpi al la varbado de paroladantoj.

Ĉiuj gebonvoluloj sin turnu al s-ro L. Cogen, 52 Dreef, Ninovo (Belgujo).

La starigintoj de la Komitato por la varbado de Esperantistaj paroladantoj por la Internaciaj Semajnoduoj):

F-ino M. Jennen, S-roj L. Demarcy, Petiau, F. Mathieu, V. Hendricx, Fr. Schoofs, Groverman, M. Somerling, J. Pirnay, L. Cogen.

Bruselo, la 29an de aŭg. 1922a.

P. S. — La Semajnoduoj komencas ĉiujare la antaŭlastan dimanĉon de aŭgusto.

Ĉiuj Esperantaj gazetoj bonvolu publikigi ĉi tiun alvokon, kaj sendi provnumeron al S-ro L. Cogen suprecititan.

Tria Semajnoduo ĉe la Monda Palaco en Bruselo
(20a de aŭgusto - 3an de septembro 1922)

La Esperantaj Paroladoj ĉe la Internacia Universitato

Sinjoroj Paul Otlet kaj Senatano Henri Lafontaine organizis dum la nunjara dua duono de aŭgusto, je la tria fojo depost la milithalto, la gravan kunvenon de multlandaj scienculoj kaj studentoj, kiun ili nomis «Internacia Semajnoduo». Okazis dum ĝia daŭro multaj diverssciencaj paroladoj en lingvoj franca, angla, hispana, itala. Multaj geaŭskultantoj el diversaj landoj ĉeestis la lecionojn de la internacia Universitato. La du organizantoj faris, kiel la antaŭajn jarojn, favoran lokon al Esperanto, kaj nia bonega franca samideano, S-ro L. Demarcy kaj via servanto prenis sur sin, iom malfrue, la nunjaran organizadon de la paroladoj en nia lingvo. Ekster si mem, ili sukcesis trovi du bonegajn gehelpantojn: fraŭlinon Jennen kaj S-ron Van de Velde (Gento), kiu, malhelpata lastmomente, estis anstataŭata de S-ro M. Somerling.

Via servanto malfermis la serion, sabaton la 26an de aŭg., parolante antaŭ deko da geaŭskultantoj, pri «La plibonigo de la Muzikskribo kaj ĝia solvo per la Aŭtonoma Muziknotado.»

Lundon, la 28an, li traktis, denove antaŭ deko da personoj, alian al si karan temon: «La plibonigo de la kalendaro.»

Mardo, la 29a de aŭg. estis vera Esperantotago. Okazis tiam tri intersekvantaj paroladoj: S-ro Somerling klarigis en vere majstra kaj instruplena maniero pri: «La barmuro de la Gileppe». Tiu vere universitata leciono estis tiel konvinkiga pri la merito de nia lingvo en la scienca kampo, ke S-ro Demarcy, ĝin ĉeestanta, ekkriis: «Diri, ke ekzistas sensprituloj neantaj la taŭgecon de Esperanto !»

Poste, fraŭlino Jennen faris en la speciala aŭskultejo kaj antaŭ multhoma publiko, tre belan paroladon kun lumbildoj pri «Ĉehoslovakujo», de kie ŝi estis reveturinta nur tri tagojn antaŭe. Multaj sciindajoj ŝi rakontis pri la historio, la geografio, la loĝantoj, la lingvoj, la kutimoj, la arto, k. c. de tiu «nova» lando, uzante dum unu horo belsonan kaj neriproĉindan Esperanton. La bildoj, lerte elektitaj, estis mirinde belaj. Certe tiu parolado impresis kaj efikis la neesperantistajn ĉeestantojn.

Fine, S-ro Demarcy parolis pri la historio de la stenografio kaj ĝia rilato kun Esperanto». Kiel enkonduko, nia amiko certigis la bonajn sentojn de la franca popolo al la belga (kaj ni, belgoj, povas doni al li la certigon pri la kora reciprokeco!) Tiam li faris rapidan trarigardon tra la historio de la stenografio de la antikva epoko ĝis nun; li insistis pri la Duployé'a sistemo, sciigante ke ekzistas almenaŭ tri alfaroj de ĝi al nia lingvo.

La diversaj geparolintoj estis kore aplaŭditaj.

Oni zorgis, ankaŭ por la diskonigo de la L. I. inter la geanoj de la Semajnoduo, disdonante multajn propagandilojn.

Post la parolado de S-ro Demarcy, kelkaj el niaj geamikoj tuj for-

is Komitaton por partoprenigi, ĉiujn jarojn, diversnaciajn paroladantojn Esperantistajn al la Semajnoduoj. Neniu loko, efektive, estas pli favora al la disvastiĝo de nia lingvo, inter la intelektularo, ol la Monda Palaco, en kies konstanta muzeo ekzistas, kiel oni scias, tre dokumentita Esperanta sekcio ĉiam pliriĉiĝanta. Neniam Esperantistaro estos sufiĉe danka al S-roj Otlet kaj Lafontaine pro la enkonduko de Esperanto en tiu Muzeo, kaj en la Internacia Universitato.

L. Cogen.

Por la Monumento Zamenhof

Sesa Listo :

J. M. de Villa, Habana: 5 dolaroj po Fr. 13.90	Fr. 69.50
Antonio Aleman Ruiz, Habana, 5 dolaroj po Fr. 13,90	Fr. 69,50
	Fr. 139,00
Antaŭaj listoj:	Fr. 810,00
Sumo :	Fr. 949,00

(Donacojn sendu al Fr. Schoofs, poŝtĉekkonto N° 284, 20, Antverpeno)

Por " Esperanta Ligilo „ de la Blindaj Esperantistoj

Sepa Listo :

Esperantistoj kiuj ĉeestis sonorilarkoncerton en Mechelen	Fr. 8,80
Ekskurso Verda Stelo al Esschen	Fr. 10.60
	Fr. 19,40
Antaŭaj listoj :	Fr. 582,30
Sumo :	Fr. 601,70

(Donacojn sendu al Fr.Schoofs, poŝtĉekkonto 284, 20, Antverpeno)

Por " Esperanta Ligilo „ de niaj blindaj samideanoj

Dank'al la malavareco de niaj belgaj geamikoj, estis eble al ni, sendi al S-ro Percy Merrick, Kasisto de «Esperanta Ligilo», unuan sumon de Fr. 500.—, produkto de la monkolekto organizita en «B.E.) Kun plezuro ni prezigas ĉi sube la enhavon de letero, kiun ni tiuokaze ricevis de S-ro Merrick, esperante, ke ĝi instigu niajn geamikojn ne ĉesi sian sindoneman oferadon de monrimedoj, por ke la direktantoj de la interesa revuo por blinduloj povu kvietkore daŭrigi sian belan entreprenon.

« Woodleigh-Shepperton (Angl.), 22an de sept. 1922

« Kara S-ro Schoofs,

« Reveninte hejmen antaŭ du tri tagoj mi ĝojege trovis vian bonkoran leteron kaj la 500 belgajn frankojn por «Esperanta Ligilo.» « la blindula Esperanta Gazeto. Mi enmetas formalan kvitancon por « la mono, kaj mi esprimas mian plenkoran dankon al vi kaj al ĉiuj

« el viaj legantoj, kiuj tiel malavare donacas al la afero. Mi dankas « ne nur pro la sumo ricevita, sed multe ankaŭ pro via propono pri « la daŭrigo de la kolektado! Al ĉiuj koncernitaj mi petas, akceptu « la korajn dankojn de la tutmonda blinda Esperantistaro! Vere, via « helpo estas gravega.

« Komprenble mi tre volonte donos ĉiajn sciigojn pri la «Ligilo» « kiujn mi povos, kaj se mi ne sufiĉe rakontas en ĉi tiu letero, bon« volu peti pluajn detalojn.

« Nia nuna financa stato estas jene:

« La produktado de la gazeto: materialo, steriotipado, presado, li« verado, de 675 ekzempleroj ĉiumonate en 32 landojn, kostas pres« kaŭ precize 50 (kvindek funtojn anglajn) po trimonate. La redak« tado kun ĉiuj korespondaj elspezoj estas senpagaj. Post la saldo « de ĉiuj ŝuldoj ĝis la fino de ĉi tiu monato, ni havas en Anglujo « 130 F. st. deponataj en banko, kaj 22 F. st. pretaj por sendi al Sve« dujo (1) laŭbezone. Krom tio ni havas en la sveda banko (enkalku« lante la 500 belgajn frankojn, kiujn mi tuj alsendos) preskaŭ sufiĉe « da mono por pagi la Decembran kalkulon. Efektive, do, nihavas sufi« ĉan por iom pli ol la unua duono de 1923 laŭ la nuntempa ĉiumonata « elspezado. Tamen, nia legantaro kreskas, kaj ĉar malmultaj el la « blinduloj povas pagi kotizojn, la pligrandiĝo de la legantaro signi« fos pligrandiĝo de elspezoj.

« Oni sendas la gazeton senkotize al ĉiuj blindaj Esperantistoj kiuj « deziras ricevi ĝin.

